

Anton Pannekoek



historia materiismo

Enhavo :

- Historia Materiismo (1919)
trad. kdo 31656 ... 3
- Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de
organizado (193?)
trad. Sovetkomunista Frakcio de S.A.T. ...19

Suplemento
de

La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut

N-ro 101 B

3,00 FF

Nov. 1974

Anton Pannekoek (1873 - 1960)

Anton Pannekoek naskiĝis en Nederlando. Mondfama astronomo, li aliĝis al la nederlanda social-demokrata partio en 1902.

Kun Hermann Gorter li partoprenis en la redaktado de la teoria organo de tiu partio: "Nieuwe Tijd".

En 1905 li ekloĝis en Germanio, kie li instruis en la lernejoj de la socialdemokrata partio. En 1909, Anton Pannekoek ekloĝis en Bremeno, kie li partoprenis la frakcian lukton kontraŭ la SPD-aparato. Li polemikis kontraŭ Kaŭcki en 1912. Li estis membro de la Zimmervalda maldekstro kaj kunfondis la nederlandan Kompartion en 1918.

Li disiĝis el la Komunista Internacio surbaze de sia subteno al la sovetmovado kontraŭ la parti-aparato. Liaj ideoj havis certan influon sur la tiama revolucia movado. Ĝis sia morto (1960) A. Pannekoek restis la ĉefa teoriulo pri la laboristaj sovetoj.

.....

L A

H I S T O R I A

M A T E R I I S M O

La loko, kiun la homa menso okupas en la historia materiismo, formas la plej multe disputatan kaj la plej malmulte komprenatan punkton en ĉi tiu doktrino. Pri tio parte kulpas ĝia difino. Difino estas unusenca, preciza kombinado de konceptoj kaj kiel pura koncepto neniam povas reflekti la riĉan multecon de la realo, tiel ankaŭ difino neniam povas esprimi la multflankajn interrilatojn en la reala mondo. Tiu, kiu okupiĝas nur pri la difino, riskas, subtile esplorante la konceptojn, nerimarkite ĉiam pli flankeniri de la reala situacio. Tiu, kiu volas koni la historian materiismon (H.M.) devas ĉiam konsideri la difinon kiel mallongan regulon por ekkompreni la interrilatojn en la realo.

La H.M. estas unue klarigo, koncepto pri la historio, speciale pri ĝiaj grandaj eventoj, la grandaj moviĝoj de la popoloj, la grandaj ŝanĝiĝoj de la socio. Ĉiujn tiujn historiajn eventojn konsistigas agadoj de homoj, homoj, kiuj ŝanĝas sian mondon aŭ provas ĝin ŝanĝi. Kio instigis ilin? Klarigo de la historio do signifas klarigon de la motivoj, kaŭzoj, kiuj instigis la homojn al agado.

Ofte instigis la homojn pereiga mizero, la fera premo de la malsato, la instinkto de sinkonservo, komuna al ĉiuj vivantaj estaĵoj. Kiom ofte en la historio okazis, ke la popolamasoj ekribelis pro malsato kaj tiel antaŭenpuŝis la revolucion. Sed krom tiu ankaŭ estas aliaj motivoj, kiuj instigas la klasojn al agado kaj determinas iliajn farojn: pli ĝeneralaj, abstraktaj, t.n. idealaj motivoj, kiuj ofte kontraŭas la propran sinkonservon kaj la proprajn interesojn kaj kapabligas al entuziasma sinofero.

En la batalantaj klasoj vivas pli profundaj pensoj kaj sentoj, ĝeneralaj konceptoj pri kio estas bona kaj necesa por la mondo, ideoj kaj idealoj, kiuj sublimiĝas

en sloganojn; kaj tiuj determinas por ilia konscio iliajn farojn. Kutime oni indikas tiujn motivojn per ĉiaj, ĝeneralaj nomoj, kiel jenaj : liberecemo, patriotismo, konservemo, malkontenteco, servuteco, revoluciememo kaj similaj. Sed estas klare, ke tiuj nomoj mem ne donas klarigon.

La materiismo de la marka klarigo de la historio ne signifas neadon de ĉi tiuj mensaj motivoj, sed reduktadon de ĉi tiuj motivoj al materiaj kaŭzoj, al la veraj interrilatoj en la homa mondo. Ni nomas tiujn realajn interrilatojn materiaj en la senco de objektivaj konstateblaj, observeblaj, kontraŭe al la subjektiva idearo, ne en la senco de materiaj kontraŭe al mensaj. Ofte aŭdiĝas, ke la realo en la homa mondo havas ĉefe mensan naturon, pro tio ke la homo estas unue volonta kaj pensanta estaĵo; ĉie en la socio kaj en la politiko la rilatoj inter la homoj ekzistas nur pro la fakto, ke ili pli malpli konscias pri ili, pere de sia konscio, sia sento, sia scio, sia volo.

Ĉi tiu kontraŭargumento ne tuŝas la H.M.-on. Ni emfazas, ke ĉie en la socio, kie homoj ekkontaktas, ankaŭ ekkontaktas realaj, konstateblaj interrilatoj, kiuj, ĉu ili precize konscias pri ili aŭ ne, ĉu ili ilin aprobas, malŝatas, rekonas aŭ ne, restas same realaj. Malantaŭ ĉiu batalo aŭ paco inter la laboristoj kaj la mastroj vidiĝas la reala situacio de vendado de laborforto de la laboristo al la kapitalisto; malantaŭ la batalo pri libera komerco aŭ protektismo vidiĝas la reala rilato inter aĉetanto kaj vendanto; malantaŭ la partiaj sloganoj pri demokratio aŭ reformo vidiĝas la reala rilato inter registaro kaj regato, inter klaso kaj klaso; ĉiu leĝo estas - krom peĉo de papero - la formulita volo de la regantoj, kiuj havas la potencon por altrudi sian volon. Ĉio ĉi - ĉu oni konsideru ĝin materia aŭ mensa - estas objektivaj konstatebla, en la senco de Marks do materia realo.

La rilatoj, kiuj ekzistas inter la homoj, ne estas hazardaj. Ili estas faktoj por la homoj, kaj ili eĉ ne povas libere elekti kiun rolon ili volas ludi en la tuto. Ili estas diktataj al ili de la ekonomia sistemo, en kiu ili vivas. La socio, la komunumo al kiu ĉiu unuopa homo

apartenas kaj ekster kiun li ne povas meti sin, estas produktad-organismo; ĝi servas por produkti por la homoj ĉion, kion la vivo necesigas - kiun ajn naturon tio havu. Unue la homoj devas vivi, do super ĉio plejpotence regas la ekonomia organismo, kiu certigas ĉi tiun vivon; la rilatoj, kiujn ĝi kreas inter la homoj estas tiel neignoreble realaj kiel la korpa ekzistado de la homo mem; ili plenumas ilian vivon kaj determinas iliajn pensojn per nerezistebla potenco. Supozi, ke oni povus meti sin ekster tion, sendependa, estas same kiel supozi ke parto detranĉita de la korpo povus memstare vivi.

La esprimo de Marks, ke la maniero, laŭ kiu la homoj gajnas sian porvivon determinas iliajn ideojn kaj instituciojn, ne signifas do, ke ĉiu homo ĉiam pensas pri manĝi kaj trinki; sed ĝi signifas, ke la produktadprocezo kreas inter la homoj certajn rilatojn, kiuj plenigas ilian vivon, do ankaŭ determinas iliajn pensadon, volon kaj sentojn. Krome, konsiderindas, ke en la tuta historio kaj ankaŭ nun la vivteno ankoraŭ ne estas certigita, tiel ke la zorgo kaj la timo pro malabundo kiel premsorgoj premas la cerbon kaj malebligas infinitan etendiĝon de la pensoj. Ekonomia sistemo, kiu forpelas ĉi tiun zorgon kaj certigas la homaron pri absoluta mastreco pri ĝiaj vivkondiĉoj, ankoraŭ ĉiam determinos la vivon kaj la pensadon per sia karaktero, sed kiom pli liberaj, larĝaj kaj senzorgaj estos tiuj pensoj!

Nu, kial la ekonomiaj rilatoj estas tiaj, kiaj ili estas? La produktadmaniero, kiu determinas la ekzistadon de ĉiu homo, mem estas produkto de homoj. Ĝi estas konstruita de la homaro dum centjarojn longa laboremo kaj disvolviĝo. Tiel ankaŭ nun ĉiu kunlaboras por plia disvolviĝo. Serĉante la ĉefajn elementojn de ĉi tiu disvolviĝo, la gravajn fortojn, kiuj formis la produktadmanieron, oni baldaŭ trovos la teknikon kaj la juron.

"Das Recht bestimmt die Wirtschaft" (= La Juro determinas la ekonomion), tiel Stammler formulis sian kontraŭargumenton kontraŭ la marksismo. Ĉi tie ne nur aŭdiĝas la deziro de juristo meti la objekton de sia studado super ĉio kiel la ĉion determinanta fundamento de la socio. Ankaŭ oni spuras la kontraŭon inter materio kaj menso. La tekniko entenas la materialan elementon, la videblajn movojn

de brako, instrumento, maŝino. Sed la videbla laborpraktiko sole ne estigas la produktadmanieron; tiun kreas nur la reguligo de la juraj formoj, sub kiuj oni laboras. Ne la instrumento aŭ la maŝinoj, sed la libera dungokontrakto, la libera var-interŝanĝado, la libera konkurado, la libera ekspluatado kreis la kapitalismon. La materia elemento, la teĥnika procedo, do estas regataj kaj gvidataj de mensaj rilatoj, de juraj reguloj. La mensa elemento, la maniero, laŭ kiu la homoj aranĝas per siaj volo kaj prudento siajn reciprokajn rilatojn, estas unuaranga. (Ĝis ĉi tie reprodukto de la ideoj de Stammler, Red.)

Nu, tuj oni povas rimarki, ke la kontrasto inter teĥniko kaj juro ne koincidas kun tiu de materio kontraŭ menso; la juro estas ne nur regulo, sed deviga potenco; ĝi estas ne nur la formulo de la leĝa artikolo, sed ankaŭ la sabro de la policisto kaj la fortika muro de la malliberejo; kaj pri la mensa elemento de la teĥniko ni ankoraŭ povos diskuti.

Cetere, la tezo de Stammler estas ĝusta. Kapitalisma produktado signifas ne nur produktadi per maŝinoj kaj en fabrikoj, sed ĝi signifas tiun produktadon sub regado de la privatposedo. La produktadmaniero estas certa teĥniko, reguligita per certaj juraj kaj posedaj rilatoj. Sed Stammler nur parte pravis en tiu tezo. Ambaŭ faktoroj, teĥniko kaj juro, ne estas samvaloraj. La teĥniko estas ekzistanta bazo, kiun la homo ne laŭvole povas ŝanĝi, dum la juron, la leĝon la homoj ja laŭvole povas ŝanĝi. Ne arbitre: la homoj reguligas siajn rilatojn, do fiksisian juron tiel, kiel certa, ekzistanta teĥniko tion necesigas, por ebligi kaj disvolvi la produktadon.

La teĥniko de la manufakturo ebligis kaj necesigis la etburĝan produktadmanieron kaj devigis la homojn fari el la privata posedo de la produktiloj, kiu tion certigis, ĝeneralan juran institucion. La grandaj maŝinoj necesigis amasfabrikadon kaj puŝis la homojn al la forigo de ĉiuj malhelpoj por la ekspluatad- kaj kontrakt-libero, kiuj baris la liberan disvolviĝon de la produktado; tiel estiĝis el la ekzistanta teĥniko kaj la al tiu adaptita jurformo, la kapitalismo.

La teĥniko do estas la baza principo; tial ĝi estas la

plej grava produktadoforto, dum la juro apartenas al la sur tio baziĝanta kaj de tio dependanta supera strukturo. Ĝuste pro tio, ke la juro determinas la ekonomion, la homoj strebas reguligi la juron kaj leĝon laŭ tiu maniero, kiu necesas por certa ekonomia strukturo de la socio. Ĉi tiu adapto de la juro al la bezonoj de la teĥniko, por realigi certan ekonomian sistemon, do ne estas spontana kaj tuja procezo, sed penigá procezo de batalo inter la klasoj. Ĝi estas la senco kaj la celo de ĉiu politika batalo kaj de ĉiuj grandaj revolucioj; la socialismo ankaŭ estas nenio alia ol tia transformo de juro kaj posedoformo, kia estas konforma al la plej matura disvolviĝo de la grandindustria teĥniko.

La bazojn de la socio, la produktadfortojn, konsistigas do ĉefe la teĥniko - en primitivaj socioj la naturaj cirkonstancoj ludas grandan rolon. Ili kreskas al ĉiam pli granda perfekteco, pro tio ke la laborpraktiko mem direktas la homan menson al la rimedoj por plibonigi ĉi tiun laboron aŭ por satigi novajn bezonojn.

La teĥnikon ne nur konsistigas la materiaj maŝinoj, fabrikoj, karbominejoj kaj fervojoj, sed ankaŭ la kapablo ilin fari kaj la scienco, sur kiu ili baziĝas.

La natursciencoj, nia scio pri la naturfortoj, nia kapablo laborigi ilin kaj kalkuli kun ili, same povas esti rigardataj kiel produktadfortoj. La teĥniko do entenas ne nur materian, sed ankaŭ grandan mensan elementon. Por la H.M. tio ĉi estas memkomprenebla; ĉar kontraŭe al la fantaziaj abstraktaĵoj de burĝaj filozofoj, ĝi metas la vivantan homon kun ĉiuj liaj korpaj bezonoj en la centron de la evoluo. En la homo la materia kaj mensa elementoj estas tiel fikse ligitaj, ke ili estas nedisigeblaj. Parolante pri la homaj bezonoj, oni parolas ne nur pri la bezonoj de la stomako, sed ankaŭ pri tiuj de la kapo kaj de la koro kaj ĉiuj estas samtempe kaj mensaj kaj materiaj. En la homa laboro, eĉ en la plej facila, la materia kaj la mensa elementoj ankaŭ ĉiam estas unuigitaj kaj estas artifika abstraktaĵo, ilin apartigi.

Tamen ĉi tiu abstraktaĵo havas historian sencon. La socia evoluo kun sia labordivido kaj klasdisigo faris el parto de la mensaj elementoj de la produktadprocezo apar-

tan funkcion de certaj personoj kaj klasoj kaj kaŭzis ambaŭflanke redukton de la tuta homa ekzistado. Tiel ĉi tiuj specialistoj, la intelektuloj, al kutimiĝis konsideri per sia laboro ĉion mensa, kontraŭe al la pli malalt-nivelaj materiaj aĵoj kaj pretervidi la organikan kaj socian unuecon de ambaŭ. Estas evidente, ke la ideo, kiun ili ekhavas el ĉi tiu falsa vidpunkto pri la H.M. devas esti tute malĝusta.

II

La historio konsistas el faroj de homoj; ĝia klarigo baziĝas sur tio, kion ni ĝenerale scias pri la homa laboro. La homo kiel organismo kun certaj difinitaj bezonoj - la postuloj por pluvivi - staras meze de la natura ĉirkaŭaĵo, el kiu li devas satigi siajn bezonojn. Liaj bezonoj kaj lia ĉirkaŭaĵo efikas sur lin; ili estas la kaŭzoj de la agadoj, per kiuj li certigas sian ekzistadon. Tio estas komuna al ĉiuj vivantaj organismoj; sed laŭgrade kiel oni atingas pli altan evolustadion en la organika mondo, sin ŝovas inter tiuj influoj kaj ĝiaj satigoj ĉiam pli mensa elemento, impulso kaj volo. El la homa evoluo estas konstatebla ĉiam pli superreganta konscio; kvankam kelkfoje la mizero povas intense ekflamigi la aŭtentajn instinktojn kiel spontanen volon, ordinaro la procezo trairas la homan menson kaj efikas pere de la penso, la ideo, la konscia volo. La bezono, sentata senpere, kaj la perceptata ĉirkaŭo efikas sur la menson kaj estigas tie pensojn kaj agadcelojn. Ĉi tiuj instigas la korpon al agado kaj kaŭzas farojn.

Por la konscio de la agantaj homoj mem la penso, la ideo estas la kaŭzoj de iliaj faroj; ĝenerale ili ne sin demandas de kie venas la penso. Tiel la ideologia historioverkado klarigas la eventojn en la historio el la ideoj de la homoj. Ĉi tio ne nepre estas malprava, sed estas ĉiam nekompleta; ĝi duonvoje haltas.

La Historia Materiismo retroiras al la kaŭzoj, el kiuj estiĝis ĉi tiuj ideoj: la sociaj bezonoj, kiuj estas la de la sociformo determinitaj pli kompleksaj formoj de la homa vivovoĵo.

En la historiaj verkoj de marksismaj verkistoj tiel la grandaj eventoj en la historio estas lumigataj de brila

lumo. Kaj tamen ankaŭ ili nevole ofte kaŭzis miskomprenojn. Se ili energie emfazas la materiajn, ekonomiajn kaŭzojn de la revolucioj, la refutema intelekto persistas en sia opinio : estas nekontesteble, ke la ideoj havis grandan influon. Li ne vidas, ke la histori-materiisma klarigo, kvankam ĝi klarigante ne longe haltas ĉe la ideoj, por interligi la unuan kaŭzon kaj la finan rezultaton, tamen nenion alian faras, ol klarigi la antaŭenpuŝantajn ideojn el iliaj sociaj kaŭzoj.

Ekzemple, la malnova koncepto pri la Franca Revolucio klarigis ĝin el la liberemo de la leviĝanta burĝaro, kiu forĵetis la jugon de absolutismo kaj nobelaro; la H.M. klarigis la kaŭzon de la revolucio el la bezono de la kreskanta kapitalismo je burĝa ŝtato. Tiam ĉi-lastaj klarigo devas esti interpretata tiel, ke la kreskanta kapitalismo vekis en la burĝaro la konscion pri la neceso de libero sur ekonomia tereno kiel sur politika, kaj vekis intensan entuziasmon por tiuj idealoj, tiel puŝante ĝin al revolucia agado.

La penso, la ideo, estas la perantoj inter la influado de la sociaj faktoroj sur la homo kaj lia historia faro. Kio tiel vivis kaj kreskis en la menso estas precipitiĝinta, kristaliĝinta en la faro, kiu transformis la socion kaj en ĝi restas eterne konservata. Sed ankaŭ alimaniere ĝi estas konservata; la pensoj, la sentoj, la pasioj, la idealoj, kiuj instigis antaŭajn generaciojn al faroj, sin esprimis ankaŭ en ĉiuj iliaj mensaj produktoj, en ilia literaturo, en ilia scienco, ilia religio, ilia arto, ilia filozofio, iliaj teorioj kaj ideologioj; kaj en tiuj ni tuj povas rekoni ilin. Ili konsistigas apartan studobjekton en ĉiuj t.n. mensaj sciencoj.

Por la ordinara historio, tiu pri la eventoj kaj faroj, ne ŝajnas necese ĉiam reliefigi ĉi tiun interpaŝon, kaj konsideri aparte ambaŭ influojn, de la materia, ekonomia mondo sur la menso, kaj ree de la menso sur la materia mondo. Kutime tie sufiĉas indiki la interrilaton inter la materia kaŭzo kaj la sociaj rezultoj; dedukti el la kresko de la produktadfortoj la transformon de la produktadmaniero kaj la por tio necesajn kaj ĝin akompanantajn klasbatalon kaj politikajn renversojn. Tiel oni kutime faras, precipe en tre mallongaj, ĝeneralaj resumoj.

Sed se oni deziras kompreni la intelektajn produktojn de periodo, ĝian ideologion, ĝian religion, ĝian arton, la evoluon de scienco, tiam la influo de la socio sur la homa menso fariĝas ĉefa afero. Kaj tiam necesas profunde esplori la problemon, kiel la materio efikas sur la menson. Tiam ĉi tiu flanko de la marksismo, la konceptoj pri la menso, la pensado, la konscio, devas esti pli larĝe disvolvata kaj aplikata.

Ankaŭ por la historioklarigo mem tio necesas kaj por forigi kontraŭargumentojn kontraŭ nia doktrino. Se ni aplikas la marksismon al la hodiaŭa mondo, la historio, kiun ni travivas kaj kreas, tiam nia starpunkto estas tute diferenca ol ĉe esploro de la pasinteco. Tio, kio okazis en antaŭaj jarcentoj : socia influado sur la homoj kaj reagoj de la homoj sur la socion estas finita; la serio da influoj, en kiuj la homa menso estas aŭ peranto aŭ interliga ĉenero, estas ĉiufoje finita, kaj la finan rezulton kaj la originalan kaŭzon ni klare vidas unu apud la alia.

Sed la sama ĉeno de kaŭzoj kaj efikoj en nia tempo ne estas finita; ni troviĝas meze en ĝi. Multnombraj estas la manieroj, laŭ kiuj la socio estas transformanta la homan menson, sen ke tio jam rezultis en sekvantan agon, aŭ la kazoj, ke nova realo apenaŭ komencis efiki sur la mensojn. Ĉi tie do ankoraŭ ne eblas kunligi socian kaŭzon kun praktika socia rezulto. Ĉi tie ni ankoraŭ troviĝas meze de kreskantaj procezoj de influo, malrapida maturiĝo de novaj opinioj, de propagando, de preparado de venontaj revolucioj.

Ĉi tie la simplaj interrilatoj, kiuj en la pasinta historio formis la argumentajn pruvojn de la H.M., ankoraŭ ne vidiĝas. Ĉi tie ŝajnas, ke en la kompleksa impliko de novaj kaj malnovaj ideoj, de revolucia klasbatalo, de reakcio kaj apatio, la doktrino en ĉiaj aspektoj konfliktas kun la realo. Kaj ĉi tie fakte aperas la demando pri la praktika agado (kiu ne ekzistas en la historioesploro): kian rolon ludas nia propra volo kaj laboro en ĉi tiu procezo?

Estas konate, ke ĉi tiu flanko de la marksismo (pro evidentaj sociaj kaŭzoj) en la pasintaj kvindek jaroj (la artiklo aperis en 1919a, Red.) ricevis tro malmulte da

atento. La socialdemokratio en la parlamenta periodo de la maturiganta kapitalismo limigis sin al preparo kaj kvieta propagando; la proletaro ankoraŭ ne estis matura por revoluciaj faroj, do necesis, ke la teorio pruvu la neeviteblecon de la socialisma revolucio el la kapitalisma evoluo. Tial ke la socialdemokratio ne alvokis al faroj, sed inverse, instigis al atendado, ĝis la materiaj cirkonstancoj estos maturaj, la teorio ekhavis la formon de mekanika rilato inter ekonomiaj kaŭzoj kaj sociaj revolucioj, en kiu la interliga ĉenero de la homa aktivo malaperis. Estas konate, kaj ne hazarde, ke ĝuste tiuj inter la teoriuloj, kiuj pledis por nova, pli aktiva taktiko, ankaŭ en la teorio emfazis la perantan funkcion de la homa menso kaj ĝia rilato, pasive kaj aktive, ricevante kaj efikante, kun la socio.

III

Ĉiuj agadoj de la homoj okazas per interveno de la homa menso. La H.M., kiel scienco pri la homa faro, devas do tre intime rilati kun certa scienco pri la menso. Ĝi eliras el certa koncepto pri la rilato inter pensi kaj esti, ĝi mem entenas novan filozofion. Ĝia filozofia bazo estas la doktrino pri la Unueco en la Universo, kiu nomiĝas simple Materiismo ĉe Marks kaj Engels.

La homa menso estas tute determinata de la ĉirkaŭanta mondo. Ĉio, kio troviĝas en la menso, devenas de la reala mondo ĉirkaŭa, kiu pere de la sensorganoj efikas sur lin. En ĉi tiu filozofia baza tezo de la H.M. ne estas konstatata mastreco de la materio super la menso, sed la unueco de la menso kun la tuta mondo. Ĉiu parto de la monda tuto estas komplete determinata de la cetera mondo. Ĝi ekzistas nur pro la unueco kun la cetero; kaj ĝia propra esenco, la tuto de ĝiaj specialaj ecoj, ne diferencas de la tuto, la sumo de la manieroj, laŭ kiuj ĝi spertas la influojn de la cetera mondo kaj ilin respegulas; la tuto de ĉiuj ĝiaj interinfluoj kun la universo. Kiam ni nomas ĝin "aĵo", tiam tio ĉi estas nur vorto, koncepto, kiu kunigas ĉiujn tiujn influojn, kiujn ni perceptas kiel fenomenojn.

Tiel ankaŭ la homa menso... (ankaŭ ĉi tiu koncepto estas nur resumo de senfina serio da intelektaj fenomenoj) tiel ankaŭ la homa menso estas parto de la Universo, kiu

konstante interinfluadas kun la cetero.

El ĉi tiu mondo ĉiaj efikoj influas la homon kaj reciproke li, pere de sia korpo, efikas sur la mondon. Kompreneble, ĉi tie per "mondo" ni ne nur celas la materialan mondon. Nia universo ne estas tuto de ĉio, kio estas korpa kaj pesebla, sed de ĉio, kio estas observebla kaj tial reala. Al tio ankaŭ do apartenas ĉio mensa en la kapoj de la homoj. Kompreneble, ne la imagitaj objektoj de la fantazio; ĝenerala mondsprito aŭ absoluta ideo ne apartenas al la reala materia mondo. Sed la imagaĵoj mem pri tia fantazia spirito, kiuj ekzistas en kelkaj kapoj, la fantaziaĵoj kaj ĥimeroj mem estas ekzistantaj, do realaj en nia senco de la vorto. Ĉi tiu tuta reala mondo estas materia por nia menso kaj kontrastas kun ĝi kiel materio. Ĉio, kio estas en ĝi, estas la influoj de la ĉirkaŭanta mondo. Kaj ĝia eksterordinara esenco estas nenio alia ol la resumo de ĝiaj ecoj, la maniero, laŭ kiu ĉi tiuj influoj estas asimilataj kaj digestataj.

La unua grava eco estas la kapablo kolekti : la memoro. Kiel senfina fluo la impresoj, la efikoj de la mondo eniras la menson kaj estas tie kolektataj. La bildo, ke la tempofluo nin preterpasas kiel la ŝnuro de pramo, preter kiun ni flosas - ĉiam kaptante unu punkton, la nuntempon, kiu tuj ree forglitas el niaj manoj - estas neĝusta bildo. La senfina ŝnuro intertempe estas enŝipigata kaj rulvolvita eniras la holdon de nia ŝipo. La eventoj en la universo enfluas nin kaj ni ĉiam fariĝas novaj kaj aliaj. Ĉiam pli riĉaj niaj spertoj, ĉiam pli plena kaj granda la enhavo de nia konscio. Kion faras la menso kun ĉi tiu daŭra kreskanta amaso da impresoj ?

La dua eco, kiu karakterizas la esencon de la menso, estas la abstraktkapablo. La infinite diverseca amaso da impresoj, kiuj penetras la menson, estas transformata en abstraktan bildon, en kiu estas resumita la ĝeneraleco de la konkretaj fenomenoj en konceptoj. La tekniko de ĉi tiu procezo, la rilato inter la imago kaj la objekto, la esenco de la konceptoj kontraste al la realo, estas majstre klare priskribita de Dietzgen kaj ne bezonas esti detale pritraktata ĉi tie. En la koncepto esprimiĝas tio ĝenerala, esenca, komuna, eterna de tiu parto de la mondo,

de tiu grupo da fenomenoj, kies bildo ĝi estas; en la abstraktaj konceptoj malaperis tio aparta, diferenca, ŝanĝanta de la realo. La infinita multeco kaj diverseco de la mondo ne povas esti kolektataj en nia kapo. Tial la menso devas plisimpligi ilin, rezignante pri diferencoj kaj diversecoj, kiuj estas akcesoraj kaj hazardaj. La konceptoj estas evidente limdifinitaj neŝanĝeble, severe kaj precize, dum la realo, kiu kristaliĝas en ili, preterfluas kiel rivero, ĉiam alie, senfine diversece.

El tio sekvas, ke la konceptoj mem ne kviete povas ekzistadi. Ili ĉiam denove devas esti ŝanĝataj, transformataj, alie difinitaj, anstataŭataj de aliaj kaj tiel adaptataj al la ŝanĝanta realo.

Seninterrompe la fluo de impresoj kaj spertoj penetras en la menson el la ekstera mondo, estas tie kolektata, digestata, distilata, ĝeneraligata en ideoj, konceptoj, opinioj, sentoj, reguloj, la enhavo de la konscio kaj poste malaperas en la subkonscio kaj la forgeso. Se la novaj ideoj harmonias kun la jam formita bildo, pro tio ke la ĉirkaŭanta rondo ĉiam revenas en la samaj formoj, tiam ĉi tiu koncepta bildo estas ĉiam pli fiksata kaj ŝtoniĝas en netuŝebla intelekta posedaĵo. Kaj ĝi ne perdiĝas kun la individuo. Per la sociaj kunvivado kaj kunlaborado okazas daŭra interŝanĝado de ideoj, konceptoj. La intelekta posedaĵaro de la mondo ne estas individua, sed kolektiva posedaĵaro. La intelekta posedaĵaro, kiun socio en la paso de la tempo akiris, estas transdonata al la nova generacio. Tiel longe kiel la vivcirkonstancoj restas samaj, tiu ĉiam denove trovas la transdonitan sistemon de konceptoj kaj ideoj en harmonio kun la realo. La ideologio tiam daŭre estas pli firme fundamentita kaj nedubebla.

Sed supozu, ke nun la mondo ŝanĝiĝas; per la homa laboro mem la socio alprenas ĉiam novajn formojn. Novaj impresoj, novaj spertoj penetras la menson kaj ne kongruas kun la malnova mondkoncepto. Nun la menso ekkonstruas, uzante la malnovan posedaĵaron kaj la novajn akiraĵojn. Malnovaj konceptoj estas ŝanĝataj aŭ alie difinitaj, novaj estas konstruataj, opinioj aliĝas, novaj opinioj fiksiĝas, nova idearo estigas, pli malpli rapide, el fragmentoj de la malnovaj, kiuj estas pli malpli adaptataj al la novaj

spertoj. Ĝi estas la sama procezo, kiu ankaŭ okazas dum la progreso de la natursciencoj, pro kio noviĝas kaj aliĝas la bildo, kiun ni konstruas pri la naturo. Tamen kun tiu diferenco, ke la evoluo en la lasta kazo ne okazas pro tio, ke la mondo mem grave ŝanĝiĝas, sed nur pro tio, ke nia sperto de la mondo daŭre ŝanĝiĝas pro la ĉiam progresanta kaj pli akurata esplorado de la naturo. Kaj krome, ĉi tiu evoluprocezo okazas pli kviete, pli konscie kaj pli objektive, ĉar ĝi troviĝas ekster la sociaj konfliktoj, ekster la pasioj, ekster la pereiga vivmizero de la popolamasoj; ĉar ĝi ne estas afero de la amasoj, sed de malgranda gildo. (Red.: Ĉu tio nuntempe ankoraŭ tute validas, ni dubas?) Sed la socio efikas sur ĉiujn. Ĝi estas la vera mondo por la granda amaso da homoj. Ĝi altrudas ĝiajn impresojn al ĉiuj per granda potenco, ĉar la vivo dependas de ili. Pri la socio, t.e. pri la propra vivo ĉiu devas formi siajn pensojn. Ili ekkreskas spontane, nekonscie, rare kiel objektiva scienco, sed plejofte kiel subjektivaj imagaĵoj. Kaj daŭre ŝanĝiĝas la socio, la ĉirkaŭaĵo, la vivdestino - nuntempe per enorma rapideco - kaj eĉ kuntrenas kontraŭvole la plej lantajn cerbojn. En interna barakto, en intensaj bataloj aŭ en kvieta pensadlaboro, la pensoj estas revoluciigataj, iafoje subite, kvazaŭ magie, se eksteraj efikoj estas tre fortaj, iafoje ankaŭ malrapide kaj dum longa tempo apenaŭ perceptebla. Dum ĉi tiu procezo de daŭra transformiĝo okazas adaptiĝo de la konscio al la socia ekzistado.

Kiam Marks do diras, ke la socia ekzistado determinas la konscion, tio ne signifas, ke ideoj de ĉi tiu momento estas determinataj de la socio de ĉi tiu momento. La socia realo de hodiaŭ estas unu elemento, la el la antaŭa realo kreskinta idearo estas alia elemento, el kiuj kune estiĝas la nova konscio.

La unua elemento estas materia faktoro, la efiko de la materia mondo, la dua elemento estas mensa faktoro, la jam ekzistanta posedaĵaro de ideoj kaj imagaĵoj. Pro tio burĝaj kleruloj - juĝante laŭ ekstera ŝajno - kredas, ke ili povas montri la neĝustecon de la Historia Materialismo: la materia realo ne nur determinas la pensadon, sed intelektaj faktoroj estas same gravaj. Ili tiam pretervidas la fakton, ke la hodiaŭa mondo ne skribas sian bildon sur absolute blanka paperfolio, sed ke la abstrak-

ta bildo de la efikoj de ĉiuj antaŭaj situacioj estas registrita en la enhavo de la konscio. La konscion determinas la tuto de la antaŭa kaj hodiaŭa nuntempoj. La burĝa koncepto konsideras la mensan konscienharon kiel ion ekzistantan, kies originon ne necesas pli detale indiki, kio fontas el la "natura" de la menso, aŭ el abstrakta, ekster la homo ekzistanta intelekto. La marksisma koncepto baziĝas sur la konvinko, ke la enhavo de la konscio devas deveni de la efikoj de la reala mondo, kaj ĝi serĉas ties originon en la antaŭaj vivcirkonstancoj de la homoj. Kaj ĉi tio validas ne nur por la konscio; ankaŭ en la aliaj ecoj de la menso, en la emoj kaj instinktoj, impulsoj kaj kutimoj, kiuj kaŝite troviĝas en la profundejoj de la homa menso kaj aperas kiel mistera intrinseka homa naturo, manifestiĝas la hereditaj impresoj de miloj da jaroj, ekde la plej primitivaj pratempoj.

Ĉi tiu interligiteco inter socio kaj menso pliklarigas al ni la kaŭzojn, kiuj, kiel oni kutime diras, baras kaj malplirapidigas la revolucian procezon de la socio. Per tio oni ne nur celas la subjektivan faktan, ke ĉio iras pli malrapide, ol ĝi devus iri laŭ la deziro kaj opinio de elstaraj revoluciuloj, sed ankaŭ la objektivan faktan, ke la nuntempa realo tiom malmulte regas kaj determinas la menson de la homoj. Oni tiam parolas pri la potenco de la tradicio, kiel la granda forto, kiu malhelpas la evoluon. Konsiderante la nunan mondon, ĝian klasbatalon, ĝian religion, ĝian ideologion, oni daŭre konfrontiĝas kun tiu ĉi enorma potenco, kaj sen ĝi neniu klarigo eblas. Farante tion, oni ne iras ekster la marksisman kadron, ĉar ĉiu tradicio mem estas peco el la realo, kiu vivas en la kapoj de la homoj, kiu determinas iliajn farojn, kiu forte efikas sur aliulojn kaj tiel grave influas la okazantaĵojn.

Tio, kio faras ĝin tradicio, ĝia aparta naturo kontraste al aliaj mensaj fenomenoj, estas la fakto, ke ĝi estas peco el la realo de ekskluzive mensa naturo, kies materiaj bazoj radikas en la pasinteco, kiu nur vivetas de la pasinteco kaj ne plu trovas nutraĵon en la nova mondo. Kiel ekzemploj povas servi la influegaj ideologioj, kiuj plej potence regas la mensojn de la laboristoj kaj ilin detenas de la socialismo: la religio kaj la naciismo. Kiel la religio ekkreskis el la primitiva etburĝa produktadmaniero,

kiel ĝi daŭre ŝanĝis siajn formon kaj aspekton, kiel ĝi estis esprimiĝo de sociaj organizaĵoj, kiuj intertempe pli kaj pli perdis siajn sociajn bazojn, estas jam ofte priskribita en multaj verkoj kaj artikoloj. La naciisma ideologio sin distingas de la aliaj pro tio, ke ĝi radikas en la kapitalismo, por la burĝaro estas vivanta realo, do ankoraŭ pli juna kaj pli freŝa tradicio, kiu tial ankoraŭ pli forte influas la laboristojn.

Povas ŝajni strange, ke ideologio povas ankoraŭ tiom longe teni sin, post kiam ĝiaj bazoj, kiuj nutris ĝin kaj la realo, kiu kreis ĝin, jam de longe malaperis. Por ĝi, tamen, validas la samaj reguloj, kiuj validas por ĉio mensa en la homo. Ĝi ne nur restas ekzistanta kiel propra estaĵo, kiel la memoro restas post la impresoj kaj ĉiu mensa bildo post serio da impresoj, sed ĝi eĉ estas ege fortigata de la reciproka mensa influado inter la homoj. Samkiel la sensocentroj en la cerbo estas ne nur ekscitataj de eksteraj ekscitoj, sed ankaŭ estas milspece interligitaj, reciproke influas unu la alian kaj tiel kreas intelektan kapablon de asociadoj, kiun grandparte ne influas efikoj el la ekstera mondo -- same ankaŭ en la socio, tio, kio iam ideo estiĝis en la homkapoj, efikas kiel nova forto sur aliajn homojn. La ekstera mondo, kiu influas nian menson, ekzistas ne nur el la mutaj faktoj de vivo kaj ĉirkaŭo, sed ankaŭ el tio, kion aliaj homoj diras al ni, kiel precipitiĝon de iliaj spertoj kaj el tio, kion ili - aŭ antaŭaj generacioj - registris en libroj. Tiel kiel la sonfortigilo amplifikas la origine malfortan sonon de la kordo, tiel same al ni sonas la instruo de la faktoj, de la materia vivobazo kiel forta agordo el la ĉirkaŭa homa mondo. La novaj ideoj, kiuj harmonias kun nova realo, estas propagandataj de tiuj, en kiuj unue ili ekkreskis, kiuj unue neforte aŭdis kaj distingis la novan tonon. Ilia forta krio vekas la pli junajn kaj pli lantajn mensojn. Ilia propagando kombiniĝas kun la senpera efikado de la vivspertoj kaj kaŭzas pli rapidan ekkomprenon de ilia esenco. Same la malnova ideologio estas plifortigata kaj vivtenata de la sama forto; per la mensa influo de la maljunaj sur la junaj homoj, de la malnovaj verkoj sur la nova generacio resonadas ankoraŭ kelkan tempon la malnova pensaro; ankaŭ se ne plu ekzistas ĝia unua kaŭzo

materia. Sed post multe da tempo ĝi, disonanciĝinta, devos malaperi.

Kiam nova realo ĉiutage gravuras siajn impresojn en la menso kaj ilin energie martelas en la kapojn, la malnova ideologio pereas kaj la menso devos ĉiam pli rezigni pri malnovaj opinioj kaj adapti siajn ideojn al la bezonoj de la nova socio. Tio estas malrapida, kelkfoje hezita kaj ambivalenca proceso, sed finfine ĝi tamen antaŭeniras.

Ĉar la propagando de la nova ideologio ricevas daŭre novajn impulsojn el la realo de la vivo.

En tio, la rapideco de la socia revolucia procezo ludas gravan rolon. En antaŭaj tempoj, kiam ĝi okazis malrapide, la el la socio kreskintaj pensoformoj ŝtoniĝis kiel rustfiksiĝintaj dogmoj. En tempoj de rapidaj ŝanĝoj la menso estas kuntrenata, ĝi fariĝas pli elasta kaj moviĝema kaj pli rapide forĵetas la malnovajn ideojn. La dekoj da jaroj malantaŭ ni, en kiu la kapitalismo kaj la proletaro devus maturiĝi al plej alta stadio, kaŭzis haltton aŭ bremsadon de la politika revolucia procezo. En ĉi tiu erao tial ankaŭ malplirapidiĝis la mensa evoluprocezo, precipe kontraste al la antaŭen sturmanta procezo de ideoformado el la antaŭa burĝa revolucia periodo. La sekvoj estis, post la brila koncipiĝo de la marksismo, refalo en reviziismajn dubojn, revigliĝo de burĝa kritiko, ĉe parto de la radikaluloj dogma rigidiĝo. Nun tamen denove komenciĝas revolucia periodo kaj ĝi sendube ankaŭ alportos rapidan revolucion de la mensoj, intensan noviĝon de la ideoj, kaj enorman intelektan revolucion.


Anton Pannekoek

Tradukis k-do 31656.

Noto de la tradukinto:

Tiu teksto estis verkita de Anton Pannekoek en 1919a kaj aperis en la nederlanda gazeto monata "La Nova Tempo".

GENERALAJ
KONSIDEROJ
PRI LA
PROBLEMO
DE
ORGANIZADO.

rganizado estas la ĉefa principo en la batalo de la laborista klaso por emancipiĝo. Pro tio la formoj de tiu organizado formas la plej gravan problemon en la praktiko de la movado de l'laborista klaso. Estas klare, ke tiuj formoj dependas de la kondiĉoj de la socio, kaj de la celoj de l'batalo. Ili ne povas esti inventaĵoj de teorio, sed devas esti konstruataj spontane de la laborista klaso mem kondukata de siaj rektaj bezonoj.

En la plivastiganta kapitalismo la laboristoj unue konstruis siajn sindikatojn. La izolita laboristo estis sen potenco kontraŭ la kapitalisto; do li devis unuiĝi kun siaj kunuloj por marĉandi kaj lukti pri la prezo de sia laborpovo kaj la horoj da laboro. Kapitalistoj kaj laboristoj havas kontraŭajn interesojn en kapitalisma produktado; ilia klasbatalo koncernas la dividadon inter ili de la tuta produkto. En normala kapitalismo la porcio de la laboristoj estas la valoro de ilia laborpovo t.e. kio estas necesa por subteni kaj ripari konstante iliajn kapablojn por labori. La restanta parto de la produkto estas la plusvaloro, la porcio de la kapitalista klaso. Por pligrandigi siajn profitojn, la kapitalistoj klopodas malaltigi la salajrojn kaj pliigi la horojn da laboro. Kie la laboristoj estis senpotencaj, la salajroj estis malaltigataj sub la ekzistominimumon; la laborhoroj pliigataj ĝis la korpa kaj spirita sanecoj de la laborista klaso tiel plimalboniĝis, ke ili endanĝerigis la estonton de la socio. La formado de sindikatoj kaj de leĝoj regulantaj laborkondiĉojn - fenomenoj, kiuj rezultis el la akra lukto de laboristoj por siaj vivkondiĉoj -

estis necesa por reakiri normalajn laborkondiĉojn en kapitalismo. La kapitalisma klaso mem agnoskas, ke sindikatoj estas necesaj por direkti la ribelon de la laboristoj en regulitajn kanalojn por malebligi ĝin manifesti en subitaj eksplodoj.

Simile la politikaj organizoj kreskis, kvankam ne ĉie en precize la sama maniero, ĉar la politikaj kondiĉoj estas malsamaj en la diversaj landoj. En Ameriko, kie la loĝantaro el kamparanoj, manlaboristoj kaj komercistoj liberaj de feŭdaj katenoj, povis plivastiĝi tra terparton kun senlimaj ebloj, konkerante la naturajn fontojn, la laboristoj ne sentis sin aparta klaso. Ili, kiel la tuta loĝantaro, estis plenaj je la mezklasa spirito de individua kaj kolektiva luktoj por persona bonstato kaj la kondiĉoj ebligis sukceson ĝis iu grado. Escepte je maloftaj historiaj momentoj aŭ inter enmigrantaj grupoj de la lastaj jaroj, oni ne sentis la neceson de aparta laborista klaspartio. En la eŭropaj landoj, kontraŭe, la laboristoj estis trenataj en la politikan batalon per la lukto de la leviĝanta burĝaro kontraŭ feŭdismo. Ili baldaŭ devis formi siajn laboristajn partiojn kaj kune kun parto de la meza klaso ili devis batali por politikaj rajtoj, por la rajto formi sindikatojn, por liberaj gazetaro kaj parolo, por ĝenerala voĉdonrajto, por demokrataj institucioj. Politika partio bezonas ĝeneralajn principojn por sia propagando; por sia batalo kontraŭ aliaj partioj ĝi bezonas teorion kun difinitaj opinioj pri la estonto de la socio. La laborista klaso en Eŭropo, en kiu komunistaj ideoj jam evoluis, trovis ĝian teorion en la scienca laboro de Marks kaj Engels, klariganta la evoluon de socio tra kapitalismo al komunismo pere de klasbatalo. Tiu teorio estis akceptita en la programoj de la socialdemokrataj partioj de la plej multaj eŭropaj landoj; en Anglio la Labor-Partio formita el la sindikatoj instruis analogajn sed pli neprecizajn ideojn pri la socialista respubliko kiel la celo de la laboristoj.

En iliaj programoj kaj propagando la proleta revolucio estis la fina rezulto de la klasbatalo, la venko de la laborista klaso super ties tiranoj devis esti la komenco de komunista aŭ socialista sistemo de produktado. Sed tiel longe kapitalismo daŭris, la praktika lukto devis centriĝi

je rektaj bezonoj kaj la konservado de la normoj en kapitalismo. Sub parlamenta registaro la parlamento estas la batalkampoj, kie la interesoj de la diversaj klasoj renkontiĝas; grandaj kaj malgrandaj kapitalistoj, terposedantoj, kamparanoj, manlaboristoj, komercistoj, industriistoj, laboristoj, ĉiuj havas siajn apartajn interesojn, kiuj estas defendataj de iliaj parolantoj en parlamento. Ĉiuj partoprenas en la batalo por potenco kaj por sia parto en la tuta produkto. La laboristoj devas partopreni en tiu batalo. Socialista aŭ laborista partio havas la specialan taskon lukti per politikaj rimedoj por la rektaj bezonoj kaj interesoj de la laboristoj en kapitalismo. Tiamaniere ili obtenas la voĉojn de la laboristoj kaj kreskas je politika influo.

II

Kun la moderna evoluo de kapitalismo la kondiĉoj ŝanĝiĝis. La malgrandaj laborejoj estas anstataŭataj de grandaj fabrikoj kaj plantejoj kun miloj aŭ dekmiloj da laboristoj. Kun la kreskado de kapitalismo kaj de la laborista klaso ĝiaj organizoj ankaŭ devis plivastiĝi. El lokaj grupoj la sindikatoj kreskis ĝis grandaj naciaj federacioj kun centmiloj da anoj. Ili devis kolekti grandajn sumojn por la subteno en grandaj strikoj kaj eĉ pli grandajn por socia asekuro. Granda stabo da estroj, administrantoj, prezidantoj, sekretarioj, eldonantoj de ĝiaj gazetoj, tuta burokrataro da organiza gvidantoj kreskis. Ili devis marĉandi kun la mastroj, ili fariĝis la specialistoj bone sciantaj la metodojn kaj cirkonstancojn. Eventuale, ili fariĝis la realaj gvidantoj, la mastroj de la organizoj, mastroj de la mono kaj de la gazetaro kontraŭ la membroj, kiuj perdis multe el sia potenco. Tiu evoluo de la organizoj de laboristoj al potenciloj super ili havas multajn ekzemplojn en historio; kiam organizoj fariĝas tro grandaj, la amasoj perdas la kontrolon super ili.

La sama ŝanĝo okazas en la politikaj organizoj, kiam el malgrandaj propagandogrupoj ili kreskas ĝis grandaj politikaj partioj. La parlamentaj reprezentantoj estas la gvidantaj politikistoj de la partio. Ili devas fari la realan lukton en la reprezentaj organizoj, ili estas la specialistoj en tiu tereno, ili funkciigas la propagandon pere de la gazetoj kaj la plenuman personaron; ilia influo determi-

nas la politikan kaj taktikan gvidliniojn de la partio. La membroj rajtas voĉdoni, helpi en propagando kaj pagi kotizon. Ili rajtas sendi delegitojn por debati en partiaj kongresoj, sed ilia potenco estas laŭnoma kaj iluzia. La karaktero de la organizoj similas al tiu de la aliaj politikaj partioj - de organizoj de politikistoj, kiuj klopodas gajni voĉojn por siaj devizoj kaj potenco por si mem. Kiam socialista partio havas grandan nombron da delegitoj en la parlamento, ĝi faras aliancon kun aliaj kontraŭ reaciaj partioj por formi laborpovan plimulton. Baldaŭ socialistoj fariĝas ministroj, ŝtatoficistoj, urbestroj kaj skabenoj. Kompreneble, en tia pozicio ili ne povas agi kiel delegitoj de la laborista klaso, regante por la laboristoj kontraŭ la kapitalista klaso. La reala politika potenco kaj eĉ la parlamenta plimulto restas en la manoj de la kapitalista klaso. Socialistaj ministroj devas reprezenti la interesojn de la nuna kapitalista socio, t.e. de la kapitalista klaso. Ili povas klopodi iniciati aranĝojn por la rektaj interesoj de la laboristoj kaj klopodi konsentigi la kapitalistajn partiojn. Ili fariĝas perantoj, pledante kun la kapitalista klaso por igi ĝin aprobi malgrandajn reformojn en la intereso de la laboristoj kaj tiam klopodi konvinki la laboristojn, ke ĉi tiuj estas gravaj reformoj, kiujn ili akceptu. Tiam la Socialista Partio kiel ilo en la manoj de ĉi tiuj gvidantoj devas subteni tiujn reformojn kaj ankaŭ anstataŭ alvoki la laboristojn batali por propraj interesoj, pacigi ilin kaj deflankigi ilin de la klasbatalo.

Vere, la batakondiĉoj plimalboniĝis por la laboristoj. Kun ĝia kapitalo la potenco de la kapitalista klaso plifortiĝis. La koncentriĝo de kapitalo en la manojn de nur kelkaj "kapitanoj pri financo kaj industrio", la koalicio de la mastroj mem metas la sindikatojn kontraŭ potencan multe pli fortan kaj ofte preskaŭ neatableblan. La akra konkurenco de la kapitalistoj el ĉiuj landoj pri merkatoj, krudaj materialoj kaj mondpotenco, la neceso uzi pligrandiĝantajn partojn de la plusvaloro por tiu konkurenco, por armigado kaj milito; la malaltiĝo de la profitgrado, devigas la kapitalistojn altigi la gradon de ekspluatado, t.e. plimalbonigi la laborkondiĉojn de la laboristoj. Tiel la sindikatoj renkontas fortiĝantan kon-

traŭstaron, la malnovaj metodoj de batalo fariĝas senutilaj. En sia marĉando kun la mastroj la gvidantoj de la organizoj havas malpli da sukceso; ĉar ili konas la potencon de la kapitalistoj kaj ĉar ili mem ne volas lukti - ĉar en tiaj bataloj la kaso kaj la tuta ekzistado de la organizoj povus perdiĝi - ili devas akcepti kion la mastroj ofertas. Tiel ilia ĉefa tasko estas kvietigi la malkontentecon de la laboristoj kaj defendi la proponojn de la mastroj kiel gravajn venkojn. Ankaŭ ĉi tie la gvidantoj de la laboristaj organizoj fariĝas perantoj inter la kontraŭaj klasoj. Kaj kiam la laboristoj ne akceptas la kondiĉojn kaj strikas, la gvidantoj devas kontraŭstari ilin aŭ permesi ŝajnbatolon, ĉesota kiel eble plej baldaŭ.

Tamen la batalon mem oni ne povas haltigi aŭ redukti ĝis minimume; la klasa antagonismo kaj la malprosperigaj fortoj de kapitalismo pligrandiĝas, do la klasbatalo devas daŭriĝi, la laboristoj devas lukti. Foje kaj refoje ili ekagas spontane, sen demandi la organizojn kaj ofte kontraŭ iliajn decidojn. Kelkfoje la sindikataj gvidantoj sukcesas obteni la kontrolon pri tiuj agadoj. Tio signifas, ke la batalo estos sufokata iom post iom en ian novan aranĝon inter kapitalistoj kaj laboristaj gvidantoj. Tio ne signifas, ke sen tiu intervenoj tiaj spontanaj strikoj estus venkigaj. Ili estas tro limigitaj al la rektaj interesigantaj grupoj. Nur nerekte la timo pro tiaj eksplodoj kondukas al singardemo ĉe la kapitalistoj. Sed tiuj strikoj pravas, ke la klasbatalo inter kapitalo kaj laboro ne povas ĉesi kaj ke kiam la malnovaj formoj ne plu estas uzeblaj, la laboristoj spontane pravas kaj disvolvas novajn agadformojn. En tiuj agadoj la ribelo kontraŭ la kapitalon estas ribelo kontraŭ la malnovajn organizajn formojn.

III

La celo kaj tasko de la laborista klaso estas la forigo de kapitalismo. Kapitalismo en sia plej alta disvolviĝo kun siaj ĉiam pli profundaj ekonomiaj krizoj, sia imperiismo, sia armigado, siaj mondmilitoj, minacas la laboristojn per mizero kaj detruo. La proletara klasbatalo, la kontraŭstaro kaj ribelo kontraŭ tiuj kondiĉoj devas daŭri ĝis kapitalista superregado estos renversita kaj

kapitalismo detruita.

Kapitalismo signifas, ke la produktadaparato estas en la manoj de la kapitalistoj. Ĉar ili estas la mastroj super la produktiloj kaj sekve super la produktoj, ili povas kapti la plusvaloron kaj ekspluati la laboristan klason. Nur kiam la laborista klaso mem mastros la produktilojn, ekspluatado ĉesos. Tiam la laboristoj plene kontrolos siajn vivkondiĉojn. La produktado de ĉio necesa por la vivo estos la komuna tasko de la komuneco de laboristoj, kiu tiam estos la komuneco de la homaro. Tiu produktado estos kolektiva procedo. Unue ĉiu laborejo, ĉiu grava plantejo estos kolektivo de laboristoj, kunigantaj siajn fortojn laŭ organizita metodo. Plie, la tuteco de la mondproduktado estos kolektiva procedo; ĉiuj apartaj laborejoj devos esti kunigataj en tutecon de produktado. Sekve, kiam la laborista klaso alproprigos al si la produktilojn, ĝi samtempe devos krei organizadon de la produktado.

Ekzistas multaj, kiuj pensas pri la proletara revolucio per terminoj el la antaŭaj revolucioj de la meza klaso, kiel serio de sinsekvaj fazoj : unue konkero de la registaro kaj instalado de nova registaro, plue eksproprigo de la kapitalista klaso perleĝe kaj poste nova organizado de la produktadprocedo. Sed tiaj fariĝoj povus konduki nur al ia ajn ŝtatkapitalismo. Kiam la proletaro levigas al potenco, ĝi samtempe disvolvas sian propran organizadon kaj la formojn de la nova ekonomia ordo. Ĉi tiuj du disvolviĝoj estas nesepareblaj kaj formas la procedon de la socia revolucio. Laborista klaso-organizado jam signifas revolucion, ĉar kapitalismo povas regi nur super neorganizitaj individuoj. Kiam tiuj organizitaj amasoj ribelas en amasaj luktoj kaj revoluciaj agadoj kaj la ekzistantaj potencoj estas paralizitaj kaj disigitaj, tiam samtempe la gvidaj kaj reguligaj funkcioj de antaŭaj registaroj transiros al la laboristaj organizoj. Kaj la tuja tasko estas daŭrigi la produktadon, la bazan procedon de socia vivo. Ĉar la revolucia klasbatalo kontraŭ la burĝaron kaj ĝiajn organojn estas neseparebla de la konkero de la produktadaparato fare de la laboristoj, kaj ĝia aplikado por la produktado, la sama organizo, kiu unuigas la klason por ĝia batalo ankaŭ agas kiel

organizo de la nova produktadprocedo.

Estas klare, ke la organizaĵaj formoj de la sindikato kaj politika partio hereditaj el la periodo de plivastiganta kapitalismo tie estas senutilaj. Ili evoluis ĝis instrumentoj en la manoj de gvidistoj nekapablaj kaj nevolaj okupi sin per revolucia lukto. Gvidistoj ne povas fari revoluciojn; laboristaj gvidistoj abomenas proletaran revolucion. Por la revolucia lukto la laboristoj bezonas novajn formojn de organizado, en kiuj ili tenas la potencojn de agado en siaj propraj manoj. Ne estas necese klopodi konstrui aŭ imagi tiujn novajn formojn; ili povas estiĝi nur en la praktika batalo de la laboristoj mem. Ili jam estiĝis tie; ni nur bezonas esplori la praktikon por trovi ĝiajn komencojn ĉie, kie la laboristoj ribelis kontraŭ la malnovajn potencojn.

En spontana striko la laboristoj mem decidas ĉiujn aferojn per regulaj kunvenoj. Ili elektas strikkomitatojn kiel centrajn korpojn, sed la membroj el tiuj komitatoj povas esti revokataj kaj anstataŭigataj je ĉiu momento. Se la striko vastiĝas super granda nombro da fabrikoj, ili akiras unuecon de agado per pli grandaj komitatoj konsistantaj el delegitoj de ĉiuj apartaj fabrikoj. Tiaj komitatoj ne estas korpoj por fari decidojn laŭ siaj propraj opinioj, kaj super la laboristoj; ili simple estas komisiitoj, komunikantaj la opiniojn kaj dezirojn de la grupoj, kiujn ili reprezentas kaj inverse portantaj al la fabrikkunvenoj, por diskuto kaj decido, la opiniojn kaj argumentojn de la aliaj grupoj. Ili ne povas ludi la rolon de gvidistoj, ĉar ili povas esti tuj anstataŭigataj de aliaj. La laboristoj mem devas elekti sian vojon, decidi siajn agadojn; ili tenas la tutan agadon kun ĉiuj ĝiaj malfacilaĵoj, ĝiaj riskoj, ĝiaj respondecokoj en propraj manoj. Kaj kiam la striko estas pasinta, la komitatoj malaperas.

La nura ekzemplo de moderna industria laborista klaso kiel mova forto de politika revolucio estis la rusaj revolucioj de 1905a kaj 1917a. Tie la laboristoj de ĉiu laborejo elektis delegitojn kaj la delegitoj de ĉiuj laborejoj kune formis la "soveton", kie la politika situacio kaj necesaj agadoj estis pridiskutataj. Tie la opinioj de la laborejoj estis kolektataj, iliaj deziroj harmoniig-

ataj, iliaj decidoj formulataj. Sed la sovetoj, kvankam forta direktiga influo por revolucia edukado per agado, ne estis ordonantaj korpoj. Kelkfoje tuta soveto estis arestata kaj reorganizata per novaj delegitoj; kelkfoje, kiam la aŭtoritatoj estis paralizitaj per ĝenerala striko, la sovetoj agis kiel loka registaro, kaj delegitoj de la liberaj profesioj aliĝis por reprezenti sian labor terenon. Ĉi tie ni havas la organizadon de la laboristoj en revolucia agado, kvankam kompreneble neperfektan, palpantan kaj klopodantan por novaj metodoj. Tio eblas nur kiam ĉiuj laboristoj per ĉiuj siaj fortoj partoprenas en la agado, kiam ilia ekzistado mem estas pridecidota, kiam ili reale partoprenas en la decidoj kaj estas tute dediĉitaj al la revolucia lukto.

Post la revolucio tiu ĉi sovetoorganizado malaperis. La proletaraj centroj de granda industrio estis malgrandaj insuloj en oceano de primitiva agrikultura socio, kie kapitalista disvolviĝo ne jam komenciĝis. La tasko iniciati kapitalisman evoluon estis por la komunista partio. Samtempe politika potenco centriĝis en ĝiajn manojn kaj la sovetoj estis degradataj ĝis neĉefaj organoj kun nur nominala potenco.

La malnovaj formoj de organizado, la sindikato kaj la politika partio kaj la nova formo de sovetoj apartenas al nesamaj fazoj en la disvolviĝo de l'socio kaj havas nesamajn funkciojn. La unuaj devas garanti la pozicion de la laborista klaso inter la aliaj klasoj en kapitalismo kaj apartenas al la periodo de plivastiĝanta kapitalismo. La lasta devas konkeri kompletan regadon por la laboristoj por detrui kapitalismon kaj ĝian klasdividiĝon kaj apartenas al la periodo de malvastiĝanta kapitalismo. En kreskanta kaj prospera kapitalismo sovetoorganizado ne eblas, ĉar la laboristoj estas tute okupitaj plibonigante siajn vivkondiĉojn, kio eblas en tiu tempo per sindikatoj kaj politika agado. En degradiĝanta kapitalismo, premata de krizoj, ĉi tiuj estas senutilaj kaj fido en ili povus nur malebligi la plifortiĝon de memagado ĉe la amasoj. En tiaj tempoj de granda maltrankvilo kaj pligrandiĝanta ribelo kontraŭ mizero, kiam strikoj etendas tra tutaj landoj kaj tuŝas la radikojn de la kapitalista potenco, aŭ kiam post militoj aŭ politikaj katastrofoj la registara

autoritato disrompiĝas kaj la amasoj agadas, la malnovaj organizaj formoj malsukcesas kontraŭ la novaj formoj de memagado de la amasoj.

IV

Parolantoj de socialistaj aŭ komunistaj partioj ofte konsentas, ke dum revolucio organoj de memagado de la amasoj estas utilaj por detruigi la malnovan superregadon; sed poste, ili diras, ĉi tiuj devas esti anstataŭigitaj de la parlamenta demokratio por organizi novan socion. Ni komparu la fundamentajn principojn de ambaŭ formoj de politika organizado de la socio.

Origine, demokratio en malgrandaj urboj kaj distriktoj estis praktikata de la kunveno de ĉiuj civitanoj. Pro la granda loĝantaro de modernaj urboj kaj landoj tio ne eblas. La popolo nur povas esprimi sian volon per elekto de delegitoj en ian centran korpon, kiu reprezentas ĉiujn. La delegitoj por parlamentaj korpoj estas liberaj agi, decidi, voĉdoni kaj regi laŭ sia propra opinio; laŭ "honoro kaj konscienco", kiel ofte estas dirite per solenaj terminoj.

La sovetaj delegitoj, kontraŭe, estas ligitaj per mandato; ili estas senditaj simple por esprimi la opiniojn de la laboristaj grupoj, kiuj sendis ilin. Ili povas esti revenigataj kaj anstataŭigitaj je ĉiu momento. Tiel la laboristoj tenas la potencon en propraĵa manoj.

Aliflanke la membroj de parlamento estas elektitaj por fiksita nombro da jaroj; nur en la voĉdonejo la civitanoj estas mastroj - dum tiu sola tago, kiam ili elektas siajn delegitojn. Kiam tiu tago pasis, ilia potenco forvaporis kaj la delegitoj estas sendependaj, liberaj agi dum periodo da jaroj laŭ sia propra "konscienco", limigitaj nur de la scio, ke post tiu periodo ili denove devos renkonti siajn elektintojn; sed tiam ili kalkulas kapti iliajn voĉojn en brua elekta vetlukto, bombante la konfuzajn elektontojn per devizoj kaj demagogaj frazoj. Tiel ne la elektontoj, sed la parlamentanoj estas la veraj mastroj, kiuj decidas pri la politiko. La elektantoj eĉ ne sendas personojn laŭ sia propra elekto kiel delegitojn; ili estas prezentataj al ili fare de la politikaj partioj. Kaj krome, se ni supozas, ke la popolo povus elekti kaj sendi personojn laŭ

sia propra elekto kiel delegitojn, tiuj personoj ne formus la registaron; en parlamenta demokratio la leĝdona kaj plenuma potencoj estas disigitaj. La vera registaro reganta super la popolo estas formita de burokrataro de oficistoj, tiel malproksime de la voĉo de la popolo, ke ĝi praktike estas sendependa. Tiel eblas, ke kapitalista regado sin tenas per ĝenerala voĉdonado kaj parlamenta demokratio. Estas pro tio, ke en kapitalistaj landoj, kie la plimulto el la popolo apartenas al la laboristaro, tiu ĉi demokratio ne povas konduki al la konkero de la politika potenco. Por la laborista klaso parlamenta demokratio estas ŝajndemokratio, dum soveta reprezentado estas vera demokratio; la rekta regado de la laboristoj super siaj propraj aferoj.

Parlamentara demokratio estas la politika formo, en kiu la diversaj gravaj interesoj en kapitalista socio influas la registaron. La delegitoj reprezentas certajn klasojn kaj kamparanojn, komercistojn, industriistojn, laboristojn; sed ili ne reprezentas la komunan volon de siaj elektintoj. Vere, la elektintoj en distrikto ne havas komunan volon; ili estas kolekto da individuoj, kapitalistoj, laboristoj, butikistoj, hazardo vivantaj en la sama loko, parte havantaj kontraŭajn interesojn.

Sovetodelegitoj kontraŭe estas sendataj de homogenaj grupoj por esprimi ĝian komunan volon. Sovetoj ne nur estas formitaj el laboristoj havantaj komunajn klasinteresojn; ili formas naturan grupon laborante kune kiel la personaro de unu fabriko aŭ sekcio de grava plantejo, kaj estas en rekta, ĉiutaga, reciproka kontakto, havante la saman kontraŭulon, devante decidi siajn komunajn agadojn kiel samcertanaj laboristoj, en kiuj ili devas agi laŭ unueca maniero; ne nur en la demandoj pri striko kaj lukto, sed ankaŭ en la nova organizado de la produktado. Soveta reprezentado ne baziĝas sur la sensignifa grupigo de najbaraj vilaĝoj aŭ distriktoj, sed sur la natura grupigo de laboristoj en la produktadprocedo, la vera bazo de la socio.

Tamen sovetojn oni ne konfuzu kun la korporativa reprezentado, kiu estas propagandata en faŝistaj landoj. Tiu estas reprezentado de la diversaj profesioj aŭ metitoj (mastroj kaj laboristoj kune), konsiderataj kiel la

fiksaj elementoj de la socio. Ĉi tiu formo apartenas al mezepoka socio kun fiksjaj klasoj kaj gildoj, kaj en sia tendenco konfidi interesajn grupojn ĝi estas eĉ pli malbona ol parlamentismo, kie novaj grupoj kaj novaj interesoj, kreskantaj dum la evoluo de kapitalismo, baldaŭ trovas sian esprimon en parlamento kaj registaro.

Soveta reprezentado estas tute nesama, ĉar ĝi estas la reprezentado de batalantarevolucia klaso. Ĝi reprezentas nur interesojn de la laborista klaso kaj malebligas al kapitalistaj delegitoj kaj al kapitalistaj interesoj partopreni. Ĝi neas la ekzistorajton al la kapitalista klaso en socio, kaj klopodas likvidi ilin, kiel kapitalistojn, forprenante de ili la produktilojn. Kiam en la progreso de revolucio la laboristoj devas preni la funkciojn de organizado de l'socio, tiu sama soveta organizado estas ilia instrumento. Tio signifas, ke tiam la laboristaj sovetoj estas la organoj de la diktatoreco de l'proletaro. Tiu ĉi diktatoreco de la proletaro ne estas iu ruze elpensita balota sistemo, artifice ekskludanta la kapitalistojn kaj mezklasanojn el la voĉdonejo. Ĝi estas la praktikado de l'potenco pere de la naturaj organoj de la laboristoj, konstruantaj la produktivan aparaton kiel la bazon de socio. En tiuj organoj de la laboristoj, konsistantaj el delegitoj de la diversaj branĉoj de la produktadprocedo, ne estas loko por rabistoj aŭ ekspluatistoj starantaj ekster la produktiva laboro. Tiel la diktatoreco de la laborista klaso estas samtempe la plej perfekta demokratio, la vera laborista demokratio, ekskludante la malaperantan klason de ekspluatantoj.

V

La adeptoĵoj de la malnovaj formoj de organizado laŭdas demokration kiel la nuran ĝustan kaj justecan politikan formon kontraŭe al diktatoreco kiel nejusteca formo. Marksismo scias nenion pri abstrakta ĝusteco aŭ justeco; ĝi klarigas la politikajn formojn en kiuj la homaro esprimas siajn sentojn pri politika ĝusteco kiel konsekvencojn de la ekonomia strukturo de la socio. Per la marksisma teorio ni povas trovi ankaŭ la bazon de la diferenco inter parlamenta demokratio kaj soveta organizado, kiel mezklasa demokratio kaj proletara demokratio ili reflektas la diver-

sajn karakterojn de tiuj du klasoj kaj iliajn ekonomiajn sistemojn.

Mezklasa demokratio baziĝas sur socio konsistanta el granda nombro da sendependaj malgrandaj produktantoj. Ili bezonas registaron por prizorgi siajn komunajn interesojn : publikan sekurecon kaj ordon, protekton de komerco, unuformajn sistemojn pri pezo kaj mono, praktikadon de leĝo kaj juro. Ĉiuj tiuj aferoj estas necesaj, por ke ĉiu povu fari siajn aferojn laŭ propra maniero. Privata entreprenado prenas la tutan atenton, formas la vivintereson de ĉiu, kaj tiuj politikaj faktoroj estas, kvankam necesaj, nur duarangaj, kaj postulus nur malgrandan parton de lia atento. La ĉefa enhavo de socia vivo, la bazo de ekzisto de l'socio, la produktado de ĉiuj aferoj necesaj por la vivo, dividiĝas en la privataj aferoj de la apartaj civitanoj, do nature estas, ke ĝi prenas preskaŭ ilian tutan tempon, kaj ke politiko, ilia kolektiva afero, kiu provizas nur akcesorajn kondiĉojn, estas malpli grava afero. Nur dum mezklasaj revoluciaj movadoj la popolo iras en la stratojn. Sed dum ordinara tempo la politiko estas lasata al malgranda grupo da specialistoj, politikistoj, kies vivlaboro ĝuste konsistas el la prizorgado de tiuj ĝeneralaj politikaj kondiĉoj de la mezklasa afero.

La sama validas por la laboristoj tiel longe kiel ili pensas nur pri siaj rektaj intereso. En kapitalismo ili laboras dum longaj horoj, ilia tuta energio estas konsumata en la procezo de ekspluatado kaj nur malmulta spirita potenco kaj freŝa penso estas lasata al ili. Gajni salajron estas la plej rekta vivneceso; iliaj politikaj intereso, ilia komuna intereso ŝirmi siajn interesojn kiel dunglaboristoj povas esti grava, sed ankoraŭ akcesora. Tiel ili ankaŭ lasas tiun parton el siaj intereso al specialistoj, al siaj partiaj politikistoj kaj sindikataj gvidistoj. Per balotado kiel civitanoj aŭ membroj, la laboristoj povas doni kelkajn ĝeneralajn gvidliniojn, ĝuste kiel mezklasaj balotantoj povas influi siajn politikistojn, sed nur parte, ĉar ilia ĉefa atento devas resti koncentrita je ilia propra laboro.

Proletara demokratio en komunismo ĝuste dependas de la kontraŭaj ekonomiaj kondiĉoj. Ĝi baziĝas ne sur priva-

ta, sed sur kolektiva produktado. Produktado de la vivbezonoj ne plu estas persona entrepreno, sed kolektiva afero. La kolektivaj aferoj, antaŭe nomitaj politikaj aferoj, ne plu estas duarangaj, sed la ĉefa objekto de penso kaj ago de ĉiuj. Kio nomiĝis "politiko" en antaŭa socio, tereno por specialistoj, fariĝis la vivintereso de ĉiu laboristo. Ĝi ne estas la garantiado de kelkaj necesaj kondiĉoj de produktado, ĝi estas la procedo kaj la regulado de la produktado mem. La apartigo de privataj kaj kolektivaj aferoj kaj interesoj ĉesis. Aparta grupo aŭ klaso de specialistoj prizorganta la kolektivajn aferojn ne plu estas necesa. Pere de siaj sovetoj, kiuj ilin kunligas, la produktantoj mem mas-trasian propran produktivan laboron.

La du formoj de organizado ne distingiĝas en tio, ke unu fondiĝas sur tradicia kaj ideologia bazo kaj la alia sur materia produktiva bazo de socio. Ambaŭ baziĝas sur la materia bazo de la produktad sistemo, unu sur la malaperanta sistemo de la estinto, la alia sur la kreskanta sistemo de la estonto. Ĝuste nun ni estas en periodo de transiĝo, la tempo de grandkapitalismo kaj la komenciĝo de la proletara revolucio. En grandkapitalismo la malnova sistemo de produktado jam detruigiĝis en siaj fundamentoj, la ampleksa klaso de sendependaj produktantoj malaperis. La ĉefa parto de produktado estas kolektiva laboro de grandaj grupoj da laboristoj; sed la kontrolo kaj posedaĵo restas ĉe malmultaj privataj manoj. Tiu sinkontraŭa stato estas tenata per la fortaj potenciloj de la kapitalistoj, precipe la ŝtatpotenco aplikata de la registaroj. La tasko de la proletara revolucio estas detru tiun ĉi ŝtatpotencon. Ĝia vera enhavo estas la alproprigado de la produktiloj fare de la laboristoj. La procedo de revolucio estas, en alternado de agadoj kaj malvenkoj, la konstruado de la organizado de l'proletara diktatoreco, kio estas samtempe la diseriĝo, paŝon post paŝo, de la kapitalista ŝtatpotenco. Estas do la procedo de anstataŭigo de la organiza sistemo de la estinto per la organiza sistemo de la estonto.

Ni estas nur ĉe la komenco de tiu revolucio. La jarcento de klasbatalo malantaŭ ni ne povas esti konsider-

ata kiel tia komenco, nur kiel enkonduko. Ĝi malvolvis netakseblan teorion sciadon, ĝi trovis kuraĝajn revoluciajn vortojn, provo al la kapitalista postulo esti fina socia sistemo; ĝi vekis la laboristojn el la senespereco de mizero. Sed ĝia reala lukto restis limigita en la limoj de kapitalismo, ĝi estis agado per la perado de gvidistoj kaj nur klopodis akiri molajn mastrojn anstataŭ krudajn. Nur subitaj eksplodoj de ribelo, kiel la politikaj aŭ amasaj strikoj okazintaj kontraŭ la volo de la politikistoj, de tempo al tempo anoncis la estonton de memdeterminata amasagado. Ĉiu spontana striko, ne prenanta siajn gvidantojn kaj devizojn el la oficoj de partioj kaj sindikatoj, estas indiko de tiu ĉi evoluo, kaj samtempe malgranda paŝo en ĝian direkton. Ĉiuj ekzistantaj potencoj en la proletara movado, la socialista kaj komunista partioj, la sindikatoj, ĉiuj gvidistoj, kies aktiveco estas ligita al la mezklasa demokratio de l'estinto kondamnas tiujn amasagadojn kiel anarkiistajn malordojn. Ĉar ilia vidspaco estas limigita de iliaj malnovaj formoj de organizado, ili ne povas vidi, ke la spontanaj agadoj de laboristoj portas en si la ĝermojn de pli altaj formoj de organizado. En faŝistaj landoj, kie la malnova mezklasa demokratio estas detruita, tiaj spontanaj amasagadoj estos la nura formo de estonta proletara ribelo. Ĝia tendenco ne estos riparo de la antaŭa mezklasa demokratio, sed progreso en la direkton de la proletara demokratio, t.e. la diktatoreco de la laborista klaso.

Anton Pannekoek

(El "Living Marxism" IV-5).

Noto de LJP-broŝurservo :

Tiu ĉi teksto origine aperis en la numero 16, marto 1939, de "Klasbatalo" (organo de la tiama "Ŝovetkomunista Frakcio de S.A.T."). Tradukis la frakciaj respondeculoj.

Bonvolu korekti : p.10, lasta linio : artikolo anstataŭ artiklo.